

Bulgara **ESPERANTISTO**



1968

10

ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. Niaj aktualaj taskoj (N. Aleksiev)	1
Fahri Erdinç. Komunisto	2
Иван Коларов. Есперантисти	5
Aliŝer Navoi. Gazeloj	5
Stefan Paviov, B. Kavalĝiev, Vlado Vâlĉev, Coĉo Kolarov, G. Petrov. Organiza vivo	6
* * Nova sukceso de Kanada E-Asocio	11
* * Antarkta fosilio	11
* * E-Junularo postenas	12
* * Nova sukceso de Esperanto en la radiofonio	14
* * UEA lanĉas Semajnon de Internacia Amikeco	16
* * La amo, kiun Israelo malhelpas	16
* * Napalmo	16
VI. Sibircev. Bulgario—Siberio	17

Kovrilpaĝo: Solena inaŭguro de la unuaj internaciaj Esperanto-kursoj en Smoljan

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



NIAJ AKTUALAJ TASKOJ

Pasis jam kelkaj monatoj depost nia 37 Kongreso. La kongresa rezolucio estis ekspedita jam en la unuaj tagoj de junio kune kun la laborplano de la Asocia Estraro ĝis la fino de la jaro kaj la iniciatoj planitaj en ligo kun la 25-a datreveno de la socialisma revolucio en nia lando. En konciza cirkulera letero al la distriktaj komitatoj kaj la societoj de BEA estis menciitaj la antaŭstarantaj taskoj por ĉiuj niaj organizaĵoj.

Ordinare dum la someraj monatoj la organiza kaj kultura agado de multaj komitatoj kaj societoj malvigligas. Sed jam pasis la ferio, ĉiuj estas sur siaj lokoj, la lernojaro ankaŭ komenciĝis. La kutima reaktiviĝo de la esperantistaj organizaĵoj denove metas antaŭ ni la postulon rememorigi la ĉefajn taskojn de la organizita esperantistaro formulitaj en la kongresa rezolucio, kiu intertempe aperis ankaŭ en la postkongresa duobla numero de BE (julio-aŭgusto, ĉar la materialoj por la juna numero de BE jam troviĝis en la presejo dum la tagoj, kiam ni kongresis).

Ni ne esperas diri ion novan al tiuj kiuj atente studis kiel la rezolucion, tiel ankaŭ la senditajn kun ĝi laborplanojn. Tamen ni deziras atentigi ĉiujn, en kiu direkto kuŝas por la sekvantaj monatoj niaj ĉefaj taskoj.

Kie oni jam komencis la lernojaron de Esperanto, oni turnu specialan atenton al la bona organizado de la kursgvidado por deteni ĉiujn kursanojn ĝis la fino de la lerno-periodo. En konvena formo konatigu ilin kun la celoj kaj taskoj de nia Asocio, por varbi inter ili pli poste novajn membrojn. Nepre organizu internacian korespondadon en la daŭro de la kurso mem, komence kun la helpo de la kursgvidanto nature.

Kie oni ankoraŭ ne malfermis kursojn, oni faru klopodojn tiudirekte, havante antaŭvide la suprajn konsilojn.

Ĉie oni devas komenci la abonkampanjon por „Bulgara Esperantisto“, „Internacia Ĵurnalisto“, „Nuntempa Bulgario“, „Ripozo“, „Paco“ kaj „Esperanto“ de UEA (la lasta — pere de CK de BEA). Oni konsideru la enhavon de la speciala cirkulero de CK de BEA № 8 de 4. X. 1968.

Jam proksimiĝas la 1 staj monatoj de la jaro. Rekomendante pli viglan societan agadon la estraroj devas siatempe prepari materialojn por la raporto pri la tutjara agado, fari klopodojn por akurata kolektado de la membrokotizo, distribui la koncernan procentan parton por la asociaj organoj. Inter la plej agemaj kaj solidaj esperantistoj oni faru la projektoliston por la nova estraro de la koncerna societo. Detalaj instrukcioj pri la bona kampanjo estos senditaj aparte iom pli malfrue.

En ligo kun tiu grava kampanjo estas ankaŭ la tasko de la komitatoj kaj estraroj altiri novajn membrojn el la neorganizitaj esperantistoj, kies nombro ne estas neglektinda.

Nun komenciĝas la plej konvena periodo por kultur-kleriga laboro de niaj societoj. Oni organizu ĝin en la spirito de la kongresa rezolucio, kiu speciale traktas la enhavon de tiu tre grava tasko de la esperantista movado.

Kaj fine — la iniciatoj de la esperantistaj komitatoj kaj societoj donos pli grandan rezulton kaj prezentos nin digne antaŭ la socia opinio, se nia ĉiufanka agado estos bone kunligita kun la parencaj amasaj organizaĵoj laŭ punkto 2-a de la kongresa rezolucio, kaj se ĉiuj esperantistoj aktive partoprenos la pluan konstruadon de la nova, socialisma vivo en nia lando kaj popolo.

Al aktiva laboro! Al novaj sukcesoj!

KOMUNISTO

de Fahri Erdinc

Li frotetis la okulojn.

— Mi jam vekiĝis, do mateniĝis.

Sed la mateniĝo ne estis rimarkebla en la mallibereja ĉelo. Nur apenaŭ videbla lumeto penetris elsub la malsupra rando de la pordo kaj tra la luketo. Fenestroj tute mankis.

La homo palpebrumis, duonfermis la okulojn kaj iom post iom komencis distingi la murojn. Poste ekrapis al la peza pordo kaj frapis sur ĝin unu, du, tri fojojn. El ekstere aŭdiĝis paŝoj kaj raŭka tuso. Iu malfermis la luketon. Malfora strieto da lumo penetris en la ĉelon.

— Kial vi frapas tiel, he? — minace la policisto ekkriegis tra la truo. — Ne timu, ke vi mortaĉos. Ankoraŭ frue estas! . . .

La homo ree sin altrenis returne en la angulon. Li ne estis rampinta pli ol kvar metrojn kaj tamen li laciĝis, ĉar la vundoj sur la planĉoj estis ne ankoraŭ cikatriĝintaj, kaj lia tuta korpo tremis pro doloroj. Li apogis la kapon al la muro kaj apenaŭ povis fari glutmovon, kvazaŭ havante dornojn en la gorgo. Li turvis la okulojn al la muro, kie estis grate desegnita je malgrandaj kvadratoj ia kalendareto, super kiu estis skribite „1943“. La kvadratoj de la 14-a ĝis la 16-a de februaro estis forstrekitaĵoj per po du transversaj streketoj. La homo trenmove tuŝis la deksepan kvadrateton kaj forstrekis ĝin per ungo.

La tutaj muroj estis gratdesegnitaj per ĉiuj specaj surskriboj, same kiel la muroj de la turkaj gastejoj, sur kiuj ĉiu gasto havas la kutimon lasi memore fremdan aŭ sian propran penson. Tie estis skribitaj frazoj per krajonoj; post kiam la krajonoj estis forprenitaj, la skribadon oni daŭrigis per peceto da drato, splito, najleto — hazarde restintaj post la priserĉado fare de la polico; skribite estis ankaŭ per ungoj, kaj kiam oni elŝiris la ungojn, la arestitoj komencis skribi per sango. . . Iu el ili estis surskribinta: „Donu al mi fortojn, dio!“; alia forstrekis tion kaj skribis sube: „Dio estas

surda. Ni mem devas helpi al ni!“ Estis skribitaj ankaŭ muziknotoj, sed anstataŭ la kleo „go“ — serpo kaj martelo, post kiuj — la komencaj vortoj de la Internacio. . .

**Leviĝu, en mizer' dronanta
sklavar' malsata de la ter' . . .**

Poste sekvis la penso: „Ni, la bolŝevistoj, estas kneditaj el iom pli alia pasto!“ Alia frazo: „Torturoj ne konsumas nin, sed nur hardas!“.

La homo ne povis demeti sian rigardon de sur la muro. En la momento denove komencis juki lin la supro de la vorto. Lia vizaĝo malsereniĝis. En lia laciĝita konscio reaperis la horoj de la torturoj: oni estis forrazinta al li la hararon sur la supro de la vorto, kaj ĝuste tiun ĉi lokon oni kovris per senkovrila skatoleto, en kiu troviĝis pluraj pedikoj. Oni bandaĝis al li la kapon, por ke la skatoleto ne falu desur la kapo, kaj lin mem oni ĉirkaŭligis fortike. Longajn horojn la pedikoj mordis lin, kvazaŭ hirudoj suĉis al li la cerbon. . . Ĝis li svenis.

Poste ree oni kondukis lin al pridemandado: — Diru, de kiu vi prenis la flugfoliojn?

Oni, tamen, ne sukcesis elŝiri de lia buŝo iun ajn vorton.

Kaj la inkvizitoraj torturoj ne ĉesis. . .

Oni fermis lin en la karcero, kiu estis mallarĝa kiel kamentubo. Sur la plafono — ampolo de mil ŭatoj. Oni turnis al li la kapon supren, sub lian mentonon apoge oni metis stangon kaj tute proksime al liaj okuloj superpendigis la lumigitan lampon. Li povis fari eĉ ne unu movon. Se li povus malfermi la okulojn por rigardi — li tuj estiĝos blinda. Kunpremante la palpebrojn, li ploris kontraŭvole. Li apenaŭ povis spiri, sufokiĝis, ŝvitegis. . . La sango iom post iom sekiĝis en la vejnoj. . .



Poste oni ree pridemandis lin. Li ne elbuŝigis eĉ unu vorton.

... La homo ĉiujn ĉi torturojn rememoris nun. Malgraŭ la mallumego en la ĉelo, tiu terura lampo ankoraŭ brilegis penige en liaj okuloj.

Subite la seruro ekkrakis. La pordo de la ĉelo iomete malfermiĝis malrapide, kaj sur la cementita planko ruliĝis peco da pano. La homo iom leviĝis surgenue, etendis la manon kaj restis samloke mirigita — la pano estis varma. Li ne povis kompreni la favoran rilaton de tiuj, kiuj jam tri tagojn lasis lin malsata. Sed jam ĉe la unua enbuŝigo de la panpeco li tuj komprenis ĉion: la pano estis netolereble salita. La panpeco gluiĝis en lia buŝo. Tuj venis al li la penso: „Ĉu eble oni ne intencas veneni min? Aŭ certe komenciĝas alimaniere nova torturado. Li elbuŝigis la paston. . . Kelkan tempon restis senmova. Sed supozeble la panbakisto eraris? Kaj la brakoj de la homo ree etendis sin al la forĵetita pano. Li derompis ankoraŭ unu pecon. . . Kaj post la tria peco li trovis facilan manieron — komencis avide engluti, ne maĉante. Sed en sia stomako li eksentis tuj bruldoloron, sur liaj lipoj aperis salivŝaŭmo. Ne povinte plu eltoleri tiun suferon, li komencis frapi senĉese sur la pordon:

— Donu al mi akvon, akvoon!

Neniu respondis.

— Mi brulas, ho mi forbrulas! . . .

El ekstere la provoso ekkriis:

— Nu, ĉesu frapi, he! Preĝu al alaho! . . .
Li ĉion vidas!

La provoso mokis lin. La arestito komencis tordiĝi agonie en la mallarĝa ĉelo.

— Akvon! . . .

... Kaj tiu kriado ne ĉesis. La provoso en la koridoro kovris al si la kapon per la peltvesto por ne aŭdi. Poste, ne plu povante toleri la kriojn de la malfeliĉulo, li trairis la koridoron kaj eniris la ĉambron de la deĵoranto. Preninte la argilkruĉon, kiu staris en la fundo de la ĉambro, li, sen verŝi akvon en glason, levis ĝin kaj gl-gl-gl-gl — komencis mem trinki. . .

Kaj la arestito, forgesinte la doloron de siaj vunditaj piedoj, kurbiĝis kaj kun larĝe malfermitaj okuloj fiksas rigardon al la plafono. Ho, kie estas nun tiu glacie malvarma akvo, kiun oni verŝis al li laŭlonge de la dorso, por frenezigi lin? Nur kvin sekundojn ĝi gutu en lian buson, nur kvin sekundojn ĝi gutu. . . Kaj li komencis deliri. . .

La akvo donas vivon al la homo. . . Ne, ĝi ne donas vivon. Ĝi mortigas lin. . . Kaj kio estas la akvo? . . . Kombino de du hidrogenaj atomoj kaj unu oksigena. Pluvakvo, akvo el puto, el fontano. . . el torento, el rivero, el lago. . . Ĉiam la sama akvo! . . . Kaj la maroj? Ne, mi ne ŝatas la maron. Mi manĝis panon kun mara akvo. . . Akvo! . . . Estas

rakonto de Gorkij pri la akvo. . . En Smirna oni vendas la akvojn „saŝal“, en Ankara — „taŝdelèn“. . . mineralajn akvojn. . . Nur sur la stratoj la akvovendistoj krias „akv-o-o-o-o!“ . . . Akvovendistoj, venu, venu ankaŭ al mia pordo! Donu al mi akvon! . . . Kie estas la akvofaloj apud mia naskiĝurbo! . . . Kiel infano, mi banis min en la bluj riverprofundejoj. . . Se mi soifis, mi trinkis. . . Miaj dentoj fariĝis glacie malvarmaj. . . Eh, vi akvoj, alfluintaj el la monto! . . . Kiel tekstis la kanto pri la montaraj akvoj! . . .

En la monto klara akvo ŝprucas, panjo mia, nigra sango — el brust' mia, panjo mia. . .

Li demetis de si la ĉemizon kaj sin ĵetis nuda sur la plankon. Disetendinte la brakojn, li forgesis ĉion. . .

* * *

La saman vesperon oni forkondukis lin en la ĉambron por torturado. Jam en la unua tago post kiam oni lin arestis, li eltoleris ĉiujn torturojn. La batvergojn, la punan piedfiksilon, la sitelon kun sala akvo. . . Ambaŭ ekzekutistoj estis la samaj. Nekonata estis nur la homo ĉe la tablo, kun pomadŝmirita hararo, kombita je dislimo. Liaj okuloj — verdaj. La vizaĝo — ruĝa, aknoplana. Kiam la arestito estis stariĝita antaŭ li, tiu ĉi plenigis glason da akvo el la akvovazo kaj komencis trinki malrapide, je glutoj. La arestito komencis kompreni. „Tiu ĉi persono estas inspektoro. Jen pro kio oni donis al mi trosalitan panon. . .“

La inspektoro lasis la glason sur la tablon kaj ekparolis trenvoĉe, grave, kun akcento — kiel li estis leginta en la kriminalaj romanoj, ke parolas inspektoroj el „Intelligence Service“:

— Kial do ni devas uzi pli kruelajn rimedojn? Ni ĉion scias. Tio, kion ni volas de vi, estas nenio alia krom unu konfeso. Nu, diru, de kiu homo vi prenis la flugfoliojn? . . .

La arestito nek aŭdis, nek komprenis. . . Li ne demetis siajn okulojn desur la akvovazo. Kaj subite, eĉ ne sentante, li etendis la dekstran brakon al ĝi. Poste li forte kaptis per la maldakstra mano la radikon de la dekstra. La inspektoro demandis:

— Kial vi frotas al vi la manradikon? Ĉu io doloras vin?

La arestito ree aŭdis la voĉon de la akvo, kiu gluglis en la glaso:

— Jen, trinku! — diris la inspektoro. — Vi soifas, ĉu ne? . . .

La arestito pli forte ekpremis al si la manradikon kaj restis samloke, kvazaŭ alnajlita. La verdaj okuloj ekpafis lin severe.

— Se vi diros de kiu vi prenis la flugfoliojn, mi donos al vi eltrinki la akvon. Se ne, tiam mi sendos vin al la puna piedfiksilo!

La malfeliĉulo eldiris eĉ ne unu vorron. Malrapide leviĝinte, li ekpaŝis al la piedfiksilo.

La inspektoro kun kolera tono donis mallongan ordonon al la ekzekutistoj, kiuj streĉe embuskis en la angulo. Ili tuj kaptis la arestiton kaj alligis lin bulforme ĉirkau la fera tubo. La kalkanoj, sur kiuj ankoraŭ estis rimarkeblaj bluetaj makuloj el koaguliĝinta sango, estis turnitaj al ili.

— Komencu!

Ili komencis. . . La skurĝoj ekklakis sur la nudaj pledo. Ili batis senmezure. Batis. . . unu frapon. . . tri. . . kvin. . . dudek kvin. . . La pandoj de la arestito krevis, kiel putrintaj tomatoj. La ekzekutistoj ĉesis, surŝprucigitaj de sango. Unu guto de sango estis resaltinta sur la orelon mem de Injonju, kies portreto pendis kroĉita al la muro.

Ili kaptis la pendantajn harfaskojn de la arestito kaj komencis turnmovi lin. Liaj ŝvelintaj okuloj restis fermitaj. Oni malligis lin. Metis lin sur benkon kaj mergis al li la piedojn en la sitelon.

La inspektoro ankoraŭ tenis en la mano la glason kun akvo. Li proksimiĝis al la arestito kaj ree ekparolis:

— Se vi mortas, kiel ĉifonon ni elĵetos vin de la kvara etaĝo. Ni faros nur trilinean protokolon, subskribitan de la direktoro, ke vi mem saltis de tie. . . kaj tiel ni metos finon al la dosiero. Nu, lastfoje mi demandas, diru de kiu homo vi prenis la flugfoliojn! Kaj tiam, jen: trinku akvon!

Aŭdinte nenian respondon, la inspektoro kvazaŭ freneziĝis. Kolere li ĵetverŝis la akvon el la vazo sur la vizaĝon de la arestito kaj insultante diris:

— Ligu lin al la kadro de la fenestro. Tie li glaciĝu pro la frostoj! Se li konsentos konfesi ĉion, tuj sciigu al mi! . . .

En daŭro de kvin minutoj la arestito estis senvestigita kiel mortinto. Oni lasis al li nur la kalsonon. Ili malfermis la fenestron. Kaj tiel, liginte al li la manojn kaj la piedojn, ili metis sub liajn akselojn unu stangon kaj krucumis lin al la fera kadro de la fenestro. Estinginte la lampon, ili eliris el la ĉambro.

Estis vintra nokto. La frostoj pinĉis, mordis. De proksime estis aŭdeblaj la fajfoj de la venantaj kaj forveturantaj vaporŝipoj en la haveno. Ie el Skutari flagretis lumoj. . .

La arestito rekonsciiĝis pro la doloroj kaŭzataj de la ŝnuro, kiu streĉe premis forte liajn brakojn. Krom sia kapo, nenion alian parton de la korpo li povis ekmovi. Doloris lin la vundoj sur la piedoj, la dorso — glui-

ĝinta al la fera kadro de la fenestro. . . Kaj la frosta norda vento rigidigis lin. Turmentis lin la malsato kaj la soifego, sed kontraŭ ili staris la espero, la kredo kaj la revengemo. . . Li estus kontenta, se la morto venkos, kvankam li tute ne volis morti. . .

Iu tre proksima voĉo ekflustris al li: „Tiu ĉi inkvizicio estas la plej terura el ĉiuj ceteraj, ĉar ĝi daŭros longe. Via pacienco estos elĉerpita. . .“ „Ne! — kvazaŭ li respondis al la voĉo. — Kio ajn okazu, mi ne denuncos, ne perfidos miajn kamaradojn! . . .“ „Sed vi tiom multe amas la vivon, la librojn. . . Krome al kiu vi lasos vian infanon? Kaj vian edzinon? . . . Oni senigis ŝin je laboro! Kion ŝi povus fari nun? Ĉu ŝi estiĝos prostituitino? Nu, lasu vian idealon, lasu ĉion kaj konfesu! Konfesu! La kamaradoj komprenos kaj ili pardonos al vi. . . Nu, voku la provoson. . . Nu, diru al li, ke vi konfesos. . .“

— He-e-e, provoso!

La arestito ekkonvulsiiĝis ĉe la fera kadro. Kiu ekkriis tiun ĉi vorton? Kiu vokis la provoson? . . . Ĉu li sonĝis? Li komencis puŝegi sian kapon al la kadro. Poste li komencis aŭskulti streĉe. Bone. Nenion aŭdis la provoso. . . Lia penso ekŝprucis febre: „Do, mi jam fariĝas perfidulo. . .“ Ho, tiu ĉi abomena langot! Se li nur povus engluti ĝin. . . Kiom mirinda esta tiu ĉi peceto da viando—ĉion ĝi englutas, nur sin mem ĝi ne povas gluti. . . Se nur unu el liaj brakoj estus libera — li elŝirus ĝin el la radikoj mem. . . Jes, el la radikoj mem. . . Kaj subite li komprenis — necesas nur pli multe da firmeco, da kuraĝo! . . . Necesas, jes! . . .

Kaj li ekkantis la plej belajn kantojn kun plej varmaj vortoj. Poste sinsekvis laŭvice flamaj, inspiritaj versaĵoj, mirinde belaj poeziaĵoj. . . Li komencis rakonti pri Turkio, pri sia patrujo, pri sia infano, pri sia edzino. . . Poste tondravoĉe kaj terure li ekkriis el sia tuta gorgo:

— Vivu nia venko!

La arestito malrapide alĝustigis sian langon inter la antaŭaj dentoj, kunpreminte la palpebrojn kaj per sia tuta forto ekmordis ĝin. . .

. . . En noktomezo, kiam la provoso eniris kaj lumigis la lampon, li restis konsternita, kvazaŭ alnajlita. El inter la lipoj de la arestito pendis peco da viando. Sur lia brusto — larĝa kaj surkreskita de haroj — estis fluinta strio da sango — koaguliĝinta kaj nigra. . .

El bulgara: Virginia Vasileva

FAHRI ERDİNÇ

Fahri Erdinç estas talenta reprezentanto de la progresema turka literaturo. Li naskiĝis en 1917, en urbo Akhisar.

En sia rakonto „Komunisto“ la aŭtoro pen-

tpas majstre la grandan kuraĝon kaj obstinecon de la komunistoj, kiuj en lia tuta verkaro, kiel ĉie en la mondo, estas starantaj ĉefrunte de la batalo por paco, progreso kaj justeco.



ЕСПЕРАНТИСТИ

Ръка в ръката здраво вплели,
ний крачим с песен на уста,
през граници и паралели
прелитае като ята.

С различен цвят са ни лицата,
но говорът ни е един,
тъй както е една земята
и сводът необятно син.

Есперанто, есперанто,
ти език си на мира,
траен като диаманта,
и лъчист като зора.

До рамото усещаш рамо
и вяра в младите гърди,
върху развятото ни знаме
зелената звезда блести.

Със своите сърца горещи
кръстосваме надлъж и шио,
в прегръдките на наште срещи
пулсира скъпият ни мир.

Есперанто, есперанто,
ти език си на мира,
траен като диаманта,
и лъчист като зора.

ИВАН КОЛАРОВ

*Alis̄er Navoi, uzbeko poeto.
Okaze de la 525-a datreveno
de lia naskiĝo.*

GAZELOJ*

Printempo sen vi — ekzekuta flam', mortaj turmentoj, infer',
kie ruĝaj rozoj min bruligas pro l' am, kaj blankaj — glaciig as kiel ĉerk'!

Printempo sen vi — infero por mi, tage-nokte infero por mi.

Sed en la paradiz', kie loĝas vi — nek flamo, nek glac'.

Se vi volus min trovi, veni tamen al mi, —

Iru laŭ la vizaĝ', laŭ larmmsulkoj sur ĝi.

Kiel en dolĉa frukt' amara kern' ne mirigos min —

same en dolĉa buŝ' la vorta koler' ne mirigos min.

Ne mensogu pri mi, ke en tiu infer' nudas Navoi:

min vestas malfeliĉ' kaj malĝoj — la donacoj de vi.

Ne timas minacojn mi, kvankam vidas super la kap'

vian sabron oran en nokta ĉiel' kun preta la frap'!

El la rusa tradukis
Stanislav Koncibowski

* Gazeloj estas speciala orienta lirika speco de versoj.

Por montri praktikan utilon de Esperanto, la Barnaula Esperanto-Klubo aranĝas en la komenco de 1969 ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. Tutmonda esperantistaro, kontribuu por la sukceso de la ekspozicio! Rekompence vi ricevos deseĝnaĵojn de siberiaj infanoj.

Adreso: Esperanto-klubo, p. 11, Barnaul — 99, USSR.



„Malgraŭ ĉio, se oni min de mandus, kiu montaro plej plaĉas al mi, mi diros — Rodopi! Kompreneble, Rila monto estas belega, sed ĝia beleco estas sovaĝa, vireca, beleco, kiu obeigas. Rila estas monto por grimpantoj. Rodopi — por poetoj, kontempluloj. Rila estas parteto de la mondo, kaj Rodopi — mondo! Rila estas majesta insulo, Rodopi — granda maro!

Kaj kion mi diru pri Pirin? Fiera monto, kiu havas pli multe da virineco kaj moleco. Ĝia ĉirkaŭbrako estas forta kaj emocia, ĝia beleco — admirinda, intriga, sed en ĝi mankas la lirika mildeco. La rodopa pejzaĝo havas hejman komfortecon kaj varmecon. Pirin skurĝas per vipo, Rodopi — neniam. Pirin estas nur virino, Rodopi — virino kaj ankaŭ partino“.

En tiuj vortoj kaŝiĝas granda sincereco naskita en la animo de la nuntempa rodopa verkisto Nikolaj Hajtov.

Estas en Rodopi-montaro unu bela kaj tre pitoreska angulo. Imaret-Dere aŭ „Gastama Rivereto“ estas nomita ĝi jam de la turka jugo. La jarcentoj faras ĝin pli ĉarma. Vintre Imaret-Dere estas alloga poemo en blankaj versoj. Printempe — ĝia „sango“ petolas en malgrandaj arbarriveretoj. Ili ĝin sonigas kaj memorigas pri la muziko de Orfeo. Dum la aŭtuno ĝi estas larmohava reĝino de la montkoloroj. Kaj somere Imaret-Dere estas azilo por ripozo kun sia freŝa picearbaro kaj molaj herbaj tapiŝoj. Kaj ne hazarde ĉi-somere ĝi fariĝis internacia universitato de Esperanto.

Imaret-Dere — trankvila, malbrua, kuntirita en la verdaĵo de la montaro.



Leciono de la unua kurso por komencantoj.
Gvidanto G. Dimov

Freŝa alblovo de arbaro, akompanata de mildaj birdmelodioj. De malproksime vian rigardon altiras majesta blanka obelisko — monumento de la pereintoj en ribelo kontraŭ la turkoj por liberigo de tiuj ĉi sudaj bulgaraj teritorioj (la fama Ribelo Preobraĵensko en 1903 j.). La monumento staras ĉe la alta rando de Imaret-Dere. Se vi enpaŝus la lokon mem, vi estos ĉarmita de la vastaj herbejoj, kiuj portas la nomon „hajdutaj“. Bela lageto brilas meze de la verda tapiŝo. Nemaŭ proksime — la tomboj de du bravaj bulgaroj — Peju kaj Kolju Ŝiŝmanov, iom malsupre — la muzeo de Peju Ŝiŝmanov kaj kontraŭ ĝi — moderna bela domo kun surskribo „Internacia Kurso de Esperanto“. Io nova, interesa, alifoje ne vidita. Kio estas ĉi tie?

La 3-an de julio. Bone ornamita lernoĉambro. La okuloj kaptas mursloganon: „La kompasoj de l' amikeco montras — Esperanton“. La suno ŝajne ankaŭ deziras ĉeesti, aŭskulti. . . Okazas malfermo de la Internacia Esperanto-Kurso. Poloj, francoj, hungaroj,

bu'garoj kolektiĝis ĉi tien. Karaj gastoj al tiu solenaĵo estas Ivan Sulinaĝiev de la Distrikta Popola Konsilantaro, kiu malfermis la kurson dezirante al ĉiuj bonfarton kaj sukcesojn en la lingvolernado, Ivan Sarafov de CK de BEA, kiu salutis kaj kuraĝigis la gekursanojn, Jordan Jordanov de DK de BEA en Smoljan, veteranoj, gastoj.

Ekfunkciis la unua kurso por komencantoj. Vere, kiom malfacile estas instrui kaj paroligi diverslandanojn, kiuj scias nur sian nacian lingvon! Estas necesaj ne nur scioj lingvaj kaj gramatikaj, sed ankaŭ bona instrumentado. Georgi Dimov estis gvidanto de la unua lernogrupo kaj laŭ Ĉe-metodo paroligis la gekursanojn. Horo post horo, tago post tago, iom post iom ĉiuj jam komencis proksimiĝi, amikiĝi. Grandegan forton havas Esperanto por interkonatiĝo de la homoj. Eĉ la amataj de ĉiuj Tomi kaj malgranda Magdi Hatlacki el Hungario komencis paroli sen manoj, uzante jam ellernitajn vortojn. Ĉu ne la sama estis ankaŭ Ali Sabriev, kiu ĉiam for de la domo portis kun si la vortarojn? Nur tial, ĉar promenante kun la blindulo Mikloŝ li ne povas silenti. Ankaŭ s-ino Nadudvari Kati havis tre fortan emon konversacii kun Ali.

Neforgeseblajn memorojn en la koroj de la partoprenintoj en la grupo por progresintoj lasis la kursgvidantino Anjo Hurĉak. Ŝia entuziasmoplena figuro donis al ĉiuj fortojn kaj memcertecon en la lernado. Eĉ ŝia amatulo Kirĉjo, kiu preferis ludi piedpilkon, estigis pli diligenta. La plej fervoraj prezentis sin bonege ĉe la ekzamenoj. Legindaj estas la skribekzamenaj verkaĵoj de Miroljub Pavloviĉ, Maria Ivanova, Lidia Holec, kaj ne hazarde ili ricevis plej bonajn notojn.

Sed ĵen venis kursanoj por instrurajto. Sendube, estis sentebla ilia matureco. La liberajn horojn ili preferis uzi por lernado ĉu sur la herbejo, ĉu en la ĉambroj. Al ilia dispono ĉiam estis la kursgvidanto Kunĉo Vălev — energia, plena de helpemo, serĉata de ĉiuj. Pro tio ankaŭ la rezultoj estis laŭdindaj: ĉiuj, kiuj prezentis sin al ekzameno por instrurajto, faris ĝin sukcese.

Kaj kiom da kantoj estis kantataj dum la kursoj! Georgi Dimov violone kantigis ĉiujn. Vâskresen Atanasov estis kantgvidanto de la dua lernogrupo. K-do Vălev instruis tiom multe da kantoj kaj ĉiam kantigis la gekursanojn. Ĉiujn lokojn, kiujn ili vizitis, aŭdis esperantajn kantojn. Kaj montodomo „Prespa“, kaj montodomo „Momĉil Junak“ memoros pri la pola kantduopo Lucina kaj Danuta, kiuj ĉiam kantis. Ne kredeble estas ankaŭ, ke la vilaĝanoj de la proksima vilaĝo Manastir forgesos „La vesperon de l' amikeco“. La salono de la kinejo estis malgranda por akcepti ĉiujn homojn venintajn por aŭskulti programon de diverslandanoj. La programo enhavis kantojn, deklaradojn, popoldancojn — niajn kaj ali-



Ekskurse al montodomo „Prespa“.
Kursgvidanto K. Vălev



Promenado sur unu el la ĉarmaj lagoj de Smoljan

landajn. Kaj la kanto „Al Imaret-Dere“, kiu naskiĝis en tiu tempo, estis donaco por ĉiuj:

En la sinoj de Rodopmontaro
Imaret-Dere al pin' odoras.
Venis poloj tien ĉi, hungaroj,
venis homoj kun pacamaj koroj.

Vi, angul' montara, ĉarma estas.
Ree nin invitu — venos ni!
En la koroj amo al vi restos.
Espranton ĉie semos ni!

Kaj la vesperoj de la talentoj — ĉu
ne estos memorindaj? La naturo kaj

la bonaj rilatoj inter la homoj ĉiam
estas fonto de revo. Certe pro tio Ni-
kola Daskalov verkis ĉi-tie la versa-
ĵojn „Esperanto-paco“ kaj „Festivala
Sofio“ kaj Georgi Caĉev — „Al Ima-
ret-Dere“. Interesaj estis ankaŭ la kar-
navala vespero, la konkurso por „Miss
Imaret-Dere“. Violeta Goranova certe
longe konservos memoron pri la sin-
cereco, dum oni ŝin reĝinigis. Kaj la
„Rima duopo“, Andzej, Lidia ne estis
malpli interesaj.

... La trian de septembro. Fermo de la
kurso. Cent kvin gekursanoj: inter ili 27
poloj, 12 hungaroj, 2 francoj, 2 jugo-
slavoj. Gastoj al la gekursanoj estis
Dafinka Uzunova — el la DK de BKP,
N. Aleksiev — prezidanto de BEA,
J. Jordanov — prezidanto de DK de
BEA. Rekonante la grandan helpon de
la DK de BKP en Smoljan por organi-
zado de la kurso, en sia finparolo k-do
Aleksiev donis bonan pritakson al ĝia
laboro kiel unua laŭ sia specifo iniciato
en nia lando. Li stimulis la E-komitato
de Smoljan fari la novan entreprenon
ĉiujara.

Kaj ĝi fariĝos ĉiujara!

Stefan Pavlov, Smoljane

INTERVJUO DE KELKAJ KURSANOJ

1. *Viaj impresoj pri Rodopi-montaro?*

Multfoje mi estas aŭskultinta pri la
gastameco de la bulgaroj kaj pri ĝi mi
certiĝis. Sed ŝajne ĝi pli forte estas mon-
trita ĉe la rodopanoj.

Elzbieta Kuna, studentino, Pollando

Belega montaro — sinceraj homoj.
Bojĉo Mladenov, instruisto, Vraca

2. *Viaj impresoj pri la kurso?*

La kurso kombinis la utilecon kun la
agrablo.

Familio Hatlacki, kemiistoj, Hungario

Ne forgesos mi la amikan atmoŝfe-
ron, ekskursojn, vesperojn de la ami-
keco.

Miroljub Pavloviĉ, vendisto, Jugoslavio

Interjuis St. Pavlov

DISTRIKTA E-KONFERENCO EN RUSE

La 1-an de septembro j. k. la Di-
strikta Komitato en Ruse organizis kon-
ferencon kun reprezentantoj de la E-
societoj en Ruse, Bjala, vilaĝo Dve

Megili k. a. La konferencon agrable
surprizis per sia alveno la asocia sek-
retario Ivan Sarafov kaj docento Georgi
Dimov el Varna. En sia raporto pri la



ĝisnuna agado de la DK ĝia prezidanto Ĥristov anoncis, ke dum la nova lernoĵaro oni planas organizi 68 kursojn de Esperanto en la tuta Distrikto. En la diskutoj partoprenis multaj gekamaradoj. Baltaĝiev (el Bjala) parolis pri la taskoj de ilia loka E-societo okaze de la 40-a datreveno de ĝia fondiĝo dum aprilo 1969 j., kiun ili celebros solene. Okaze de tio oni nomos „Esperanto“ iun straton de la urbo, eldonos memorlibron ktp. La reprezentanto de la studentoj informis pri la 3-a Nacia Studenta E-Konferenco, kiu okazos

oktobre en Ruse. Parolis ankaŭ d-ro Zahari Boĉev el Dve Mogili, Maria Preslavska kaj Bojkov el Ruse k. a. K-do G. Dimov rakontis pri la ĵus gvidita de li 10 taga E-kurso por instruistoj en Razgrad. K-do Sarafov grave helpis la konferencon per siaj trafikrimarkoj kaj rekomendoj. En sia respondo la prezidanto de DK k-do Ĥristov esprimis la ardan deziron de la esperantistoj en la Distrikto de Ruse labori sindone, entuziasme kaj laŭplane por nia kara E-afero.

B. Kavalĝiev

AGRABLA RENKONTIĜO ĈIRKAŬ MEZEK

Bulgario estas lulilo de riĉa antikva traca kulturo. En ĝi okazis batalaj renkontiĝoj de multaj popoloj. Ĉie en nia patrolando troviĝas historiaj ruinaĵoj, kiuj lumigas la malhelon de la malproksima pasinteco. Tia historia loko estas la ĉirkaŭaĵo de vilaĝo Mezek, regiono de Svilengrad. Tie, laŭ iniciato de la Esperantista Societo „Nova Mondo“ (Svilengrad) okazis je la 25. VIII. 1968 j. renkontiĝo inter esperantistoj el Pârvomaj kaj la Turista Sekcio ĉe la Distrikta E-Komitato en Plovdiv. Partoprenis 80 esperantistoj kaj multaj gastoj. Okazis komuna solenaĵo.

Reprezentantoj de apartaj societoj salutis la ĉeestantojn. Estis disdonitaj la honorinsignoj de CK de BEA al meritaĵaj esperantistoj el Svilengrad.

Ni trarigardis la antikvan fortikaĵon, kies restaĵoj de muroj, turoj kaj embrazuroj nin dronigis en la foran pasintecon.

En la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo Mezek estas proksimume 20 altaĵoj. Plej grava el ili estas la tiel nomata Maltepe. En tiu ĉi altaĵo estas malkovrita la plej interesa kupola tombejo de mikena modelo, konata ĝis nun en Tracio. Ĝi konsistas el longa koridoro, du rektangulaj partoj kaj ĉefa kupolaspekta parto. La koridoro estas longa 20,65 m, larĝa 1,65 m kaj alta 2,50 m. Estas kovrita per duoble dekliva triangula volbo el metitaj unu sur alian ŝtonaj blokoj kaj la planko estas kovrita per grandaj ŝtonaj platoj. La dua parto estas pli vasta. La kupolo havas diametron 3,30 m, altecon 4,30 m. Inerne, kontraŭ la enirejo en abelujaŝpekta parto, estas ŝtona lito. La tuta tombeja konstruaĵo estas longa 29,95 m.

La tombejo estas malkovrita en 1931 j., kaj en ĝi estas trovitaj



La partoprenintoj en la renkontiĝo

multaj oraj, bronzaĵoj kaj argilaj objektoj. Granda parto el ili estas ekspoziciita en la Nacia Arkeologia Muzeo en Sofio.

Tiu ĉi ŝatata monumento montras la grandan politikan potencon de la reginta klaso en Tracio en la mezo de la IV jarcento antaŭ n. e.

Tre kora estis nia renkontiĝo kun lingardistoj sub la ĉefeco de oficiro Nenkov. Okazis kunveno kune kun la lingardistoj. La estro de la postenejo bonvenigis la esperantistojn kaj rakontis pri interesaj heroaj okazaĵoj en la vivo de la lingardistoj, kiuj tagnokte deĵoras ĉe posteno kaj certigas la vivon kaj la pacan laboron de la bulgara

popolo.

La reprezentanto de la Turista Sekcio prezentis donacojn al la lingardistoj. Ili tutkore dankis pro la donacoj kaj pro la vizito.

Okazis gaja amuzado, per kiu estis variigita la vivo de la soldatoj. Post tio—kortuŝa disiĝo kaj bondeziroj pri novaj vizitoj.

La esperantista renkontiĝo apud v. Mezek estis bone organizita kaj pasis ĉe granda intereso. Ĝi bonefikos por pli granda disvastigo de Esperanto kaj ĝiaj noblaj ideoj por frateco, interkompreniĝo kaj paco inter la popoloj.

Vlado Vâlcev

SOMERAJ E-TAGOJ EN BORIMA

Jam estiĝis tradicio, ke ĉiujare en vilaĝo Borima, distrikto de Loveĉ, oni organizas E-tendaron en la bela E-domo „D-ro Zamenhof“.

Ĉi-jare funkciis tri elementaj kursoj: unu—por lernantoj kaj studentoj, dua—por junpioniroj, kaj tria—por lokaj vilaĝanoj.

Kursgvidanto estis k-do Bejko Markov—lektoro de Esperanto en la Supera Ekonomia Instituto en Sviŝtov. Lin helpis la studento Karamfil Atanasov de Sviŝtov. Ĉiuj finis sukcese la kursojn kaj tuj ekdeziris korespondi kun eksterlandaj esperantistoj. Dum la feria tempo ni ofte ekskursis tra la

montaro. Ni vizitis la proksiman gronton „Sâeva Dupka“ apud vilaĝo Brestnica, kiu faris al ni imponan impreson per siaj variaj naturaĵoj.

La lastan tagon estis aranĝita „Vespero de esperantisto“, kiu estis amase vizitita de vilaĝanoj de Borima kaj junpioniroj. Ni prezentis belan artan programon.

La gajaj tagoj en amika atmosfero forflugis, sed restas por ĉiam en niaj koroj la belaj rememoroj pri la forpasinta ĉarma tempo en vilaĝo Borima.

Cočo Kolarov

respondeculo pri la vilaĝana junularo ĉe BEJ

En la pedagogia instituto de Zaporofje (USSR) oktobre estis organizita nova studenta klubo de internacia amikeco. Se oni volas helpi fondiĝon de Esperanto-sekcio ĉe tiu klubo, oni sendu amase salutleterojn en Esperanto (kun proponoj pri kunlaboro), korespond-proponojn k. a.

Adreso: Klub' internacionalnoj drufbi, Esperanto-sekcio, ul. Ŝukovskogo, 66 Pedagogia Instituto, Zaporofje — 2, Sovetunio.



Tiu ĉi slogano kaj kelke da verdaj flagetoj de E-societo „Printempo“ kune kun aliaj laboristoj kaj oficistoj de Sofia Urba Transporto ekskursis al la historia supro „Aramiec“ en la norda parto de monto Sredna Gora.

En tiu ĉi tago tie ĉi okazis grandioza festo por celebrado de la hajdutoj kaj la batalantoj por popola libero dum la heroa Aprila Ribelo. La ekskursantoj miksigis kun la festantoj kaj okazigis esperantistan kunvenon. La raporto estis mallonga, sed ĝi faris bonan propagandon de Esperanto inter

KUNVENO EN BURGAS

La 24-an de septembro j. k. la klubo de E-Societo „Nigra Maro“, Burgas, ne povis enteni la tutan anaron, kiu venis solene honori la 24-an datrevenon de la Septembra Popola Ribelo (1923 j.).

Pri ĝia signifo parolis la prezidanto de la Societo k-do Petko Gamišev.

En la dua parto de la kunveno oni aŭskultis „Impresojn pri la 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrid“. Du membroj de S-to „Nigra Maro“ partoprenis la Kongreson — Kiril Kunčev kaj Boris Golemanov. Ili rakontis pri siaj impresoj.

NOVA SUKCESO DE KANADA ESPEFANTO-ASOCIO

Kanada Esperanto-Asocio — unu el la 30 aliĝintaj landaj asocioj de UEA — atingis novan sukceson en siaj eksteraj rilatoj. La Kanada Registaro, ĉiam pli konscia pri la lingva problemo en la mondo, asignis subvencion, per kiu pluraj junaj membroj de KEA, elektitaj per rigora ekzameno, povis vojaĝi al la 53-a Universala Kongreso en Madrid. La kanada ambasadoro en Madrid, kiu salutis la Kongreson inter aliaj diplomatoj, elektis paroli nek en la angla, nek en la franca (la du oficialaj lingvoj de Kanado), sed en la Internacia Lingvo.

la neesperantistoj. La prezidanto de la Societo disdonis persone la insignon de CK de BEA al la meritaj esperantistoj el la urba transporto. Oni disĵetis multe da propagandfolioj pri Esperanto. La efekto estis granda. Multaj partoprenintoj, kiuj ĝis nun sciis nenion pri Esperanto, ekdeziris lerni la Internacian Lingvon.

La bonege pasigita tago en la belega naturo fortikigis la amikecon inter la partoprenintoj en la ekskurso kaj Esperanto akiris novajn amikojn.

G. Petrov

ANTARKTA FOSILIO

La eltrovo de peco da fosilia osto de terloĝanta vertebrulo ĉe la suda poluso povus ludi gravan rolon en la scienca diskutado pri la origino de la kontinentoj de la suda hemisfero.

La fosilio estas trovita pasintan decembron de grupo da usonaj geologoj. Ĝi estas parto de la makzelosto de granda triasa labirintodenta amfibio, probable ĉirkaŭ unu metron longa, kiu vivis en tropika aŭ subtropika arbaro apud la suda poluso antaŭ pli ol 200 milionoj da jaroj. Restaĵoj de alia fosilio de labirintodentuloj aperis en Aŭstralio kaj Sud-Afriko de proksimume sama epoko kiel la antarkta fosilio.

Proponantoj de la teorio pri la drivado de la kontinentoj asertas, ke Afriko, Antarkto, Aŭstralio, Sud-Afriko kaj Hindujo en la komenco estis kunligitaj en unu granda kontinento, kiu disrompiĝis iam en la pratempo, kaj ke ĝiaj fragmentoj malrapide drivis al la nuntempaj pozicioj. La trovo de vegetaĵaj fosilioj kaj iuj specoj de roko en la sudaj kontinentoj subtenas la teorion; sed ĝis nun neniu vertebrala animalo vivinta surtere aŭ en freŝa akvo kaj komuna al du aŭ pli da kontinentoj estas trovita en Antarkto. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

E-JUNULARO POSTENAS

VENONTA TEJO-KONGRESO OKAZOS EN SVEDIO

La venonta TEJO-kongreso, la 25-a, okazos en Tyresö, antaŭurbo de Stockholm, inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 1969. Tyresö estas tute nova urbo 17 kilometrojn for de la centro de la sveda ĉefurbo, moderna loĝurbo kun altaj domoj kaj vilaoj. La ĉirkaŭaĵo konsistas plejparte el arbaro kaj multaj lagoj. La urbo estas facile atingebla el Stoskholm, kaj rekta ŝiplinio kunligas Stockholm kun Helsinki, la urbo de la 54-a Universala Kongreso de Esperanto.

NOVA KURSO EN MALIO

Kun aprobo de la Tutlanda Komisiono por Junularo en Malio komence de marto ĉ. j. malfermiĝis kurso de Esperanto ĉe la junulara kulturdomo en la ĉefurbo Bamako. Dum la inaŭguro de la kurso parolis favore la direktoro de la kulturdomo, s-ro Albaso Toure. En la tagoj antaŭ la komenciĝo de la kurso Radio Malio disaŭdigis sesfoje pri Esperanto.

MISS POR 1968: ĈARMA SVEDINO

Ne estas facile venki en la ĉiujara Konkurso Miss Esperanto, tradicia ero de la programo de la TEJO-kongresoj. Ne sufiĉas nur beleco: senparola belulino apenaŭ adekvatas por reprezenti parolatan lingvon. Jam antaŭe la ĉiujara venkintino partoprenis la konkurson, sed malsukcesis pro... nesufiĉa lingvoscio. Sed en Tarragona la juna svedino Helene Salmose ne nur plaĉis al la okuloj de la juĝkomisiono, sed ankaŭ al la oreloj: ŝi perfekte parolis Esperanton, eĉ partoprenis la Oratoran Konkurson. Laŭ la reguloj de la konkurso Miss Esperanto estas elektata dum la kongresa balo. Tri kandidatinoj estas elektataj de la ĉeestantoj, kaj

juĝkomisiono elektas inter tiuj tri, juĝante ankaŭ la lingvokapablon. La blondulino Helene venkis kontraŭ du belaj Esperanto-eminentulinoj — Claude Nourmont, kasistino de STELO, kaj Eja Woessink, filino de la kasisto de UEA.

TEJO KAJ IFEF-JUNULARO KUNLIGIĜIS

Observanto de la Junulara Sekcio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio ekde nun partoprenos la laboron de la TEJO-komitato — jen unu el la punktoj de nove subskribita interkonsento inter TEJO kaj IFEF-junularo. Estos regula interŝanĝo de eldonaĵoj, reciproka reprezentado en kongresoj kaj komuna agado je nacia nivelo. Subskribis la interkonsenton Ulrich Lins kaj Humphrey Tonkin nome de TEJO, kaj Imre Ferenczy nome de IFEF. Ĝin ratifis la TEJO-komitato. IFEF estas inter la plej fortaj esperantistaj fakaj asocioj, kaj per tiu ĉi interkonsento multaj gejunuloj ĝis nun ekster kontakto kun TEJO havos rektan ligon kun ĝi. La studenta organizo esperantista, STELO, estas jam de kelkaj jaroj aliĝinta faka sekcio en la kadro de TEJO.

MEKSIKIA SEKCIO ALIĜIS

Esperanta Meksikia Junularo (kun 90 membroj) fariĝis la 22-a sekcio de TEJO per unuanima akcepto flanke de la komitato de TEJO. Tiel EMJ, kiu fondiĝis en 1966, fariĝis la dua latinamerika sekcio en TEJO kaj unu el la plej aktivaj ĝiaj sekcioj. Aparte sukcesa lastatempe estis la informa agado de EMJ: ĝi 11-foje aperis ĉe la televido, kvarfoje per 15-minutaj programoj, sepfoje per kvinminutaj intervjuoj; ĝi vaste distribuis flugfoliojn pri la bezono de Esperanto en la Olimpiko kaj pri Esperanto ĝenerale; naŭfoje aperis artikoloj pri EMJ en la gazetaro; dufoje ĝi okazigis ekspoziciojn. Krome, dum la jaro ĝi organizis 12 elementajn kursojn kun po 15—20 gelernantoj kaj multobligis spe-



cialan 80-paĝan lernolibron por utiligo en la kursoj. Ĝi nun planas intensan specialan agadon dum la Olimpiko, inkluzive akceptan servon por esperantistaj vizitontoj (kontakto EMJ, Laŭro Aguirre 243—3, Mexiko 17, D. F.).

PLEJ DIVERSAJ RENKONTIĜOJ PLANITAJ

Nun, kiam la someraj programoj de multaj sekcioj efektiviĝis, oni planas novajn aktivecojn por la venonta jaro. Jen mallonga resumo de kelkaj estontaj renkontiĝoj de la Esperanto-junularo.

En *Bulgario* dum ĉi-aŭtuno okazos Tria Nacia studenta Esperanto-Konferenco (Ruse). En la printempo okazos Nacia Esperanta Junulara Festivalo (Haskovo) kaj dum la somero okazos internacia laborbrigado.

Kolonjo estos la renkontiĝejo de la Dekdua Internacia Seminario de *Germana* Esperanto-Junularo (27 de decembro ĝis 3 de januaro), kiu pritraktos la temon „Sociologiaj aspektoj de la nuntempo“.

En *Belgio* la nunan oktobron okazos semajnfina renkontiĝo en Sint-Kruis.

En oktobro ĉ. j. okazos simila evento en Godalming, *Britio*.

En *Novzelando* la junularo kongresos venontan januaron.

En *Germana D. R.* okazos unua respublika konferenco de la Esperanto-Junularo en Karl-Marx Stadt.

En *Pollando* oni festos la Novjaron en Feriosemajno en la montara urbo Zakopane, kaj pos e estos Jubilea Kunveno de Pola Esperanto-Junularo en Krakow. Krome oni planas seminarion en Torun kaj du somerajn tendarojn por lern-ja junularo ankaŭ apud tiu sama urbo.

Kiel en la nuna jaro, ankaŭ venontjare oni organizos someran laborbrigadon en *Jugoslavio*.

EN JAPANIO JUNULARA AGADO EVOLUAS

La fizionomio de la Junulara Esperanto-movado en Japanio rapide ŝanĝiĝas. En 70 universitatoj kaj kolegioj funkcias oficia'e agnoskitaj studentaj Esperanto-klubo. Regula fenomeno en la japana junulara movado estas t. n. kunvivadoj, kiam renkontiĝas pluraj dekoj da gejunuloj por komune utiligi Esperanton kaj plibonigi sian lingvoscion dum difinita periodo. Ankaŭ ekzistas fortaj lokaj grupoj kaj eĉ federacioj de lokaj grupoj en certaj regionoj. Tutjapana Ligo de Alt'erneaj Esperantistoj estis fondita lastatempe kaj kunligas proksimume 50 altlernejojn, en kiuj ekzistas Esperanto-klubo (la japanaj altlernejoj estas por gejunuloj 15—18-jaraj).

GRAVAJ ŜANĜOJ EN LA TEJO-ESTRARO

Dum la TEJO-kongreso en Tarragona, Hispanio, estis faritaj kelkaj gravaj ŝanĝoj en la TEJO-Estrararo.

Hans-Michael Maitzen, 25-jara doktoro pri astronomio, el Aŭstrio, estis elektita kiel nova prezidanto de TEJO. Li estas la tria prezidanto de TEJO de post la reorganiziĝo en 1957—58. Maitzen okupiĝos pri du taskoj en la nova estraro — varbado kaj lernejoj. La sveda flegistino Ingrid Carlsson respondecos pri la servoj kaj kulturaj aferoj de TEJO. Novaj estraranoj estas ankaŭ studento pri filozofio Robert Lloancy (Francio), turisma direktoro Andrzej Grzebowski (Pollando), psikologo Marian Dobrzynski (Pollando).

RIMARKINDA KRESKO DE MEMBRONOMBRO EN PLURAJ LANDOJ

Laŭ la Raporto de TEJO por la jaro 1967/68, la membronombro de ĝiaj landaj sekcioj kreskis dum la jaro de 6137 ĝis 9376 gejunuloj. Krome 1208 gejunuloj restas organizitaj en sekcioj ĝis nun ne aliĝintaj al TEJO. Ĉar certe

multaj gejunuloj restas ekster la kadro de la landaj sekcioj, sed estas membroj de UEA (kaj do de TEJO), la membronombro de TEJO superas, aŭ povus superi almenaŭ 10 000. Aparte grandaj kreskoj okazis en Pollando, nun la plej multnombra sekcio (2600 membroj), kaj en Koreo (de 20 ĝis 230 membroj). Inter aliaj kuraĝigaj signoj estas la fakto, ke la membronombro de Itala Esperanto-Federacio kreskis per 21% en 1967 precipe pro aliĝo de gejunuloj. Sed la granda kresko ne plifortigas TEJO-n finance. Por tion fari necesas paralela kresko de individuaj membroj de UEA en la junularaj kategorioj.

ESPERANTO-DISERTACIO EN JAPANIO

Fino Mucuko Suzuki, ano de la humanisma fakultato de Tokia Urba Uni-

versitato, lastatempe diplomigis per disertacio pri la temo „Historio de la Japana Esperanto-Movado“. En Japanio la Esperanto-movado estas aparte forta inter la studentaro.

INSTRUISTOJ EN LA JARO 2000

„Por ne postresti la multigadon de lernejoj tra la mondo, bezoniĝos 70 milionoj da instruistoj de elementaj lernejoj en la jaro 2000. La nuna sistemo garantias la preparon de nur 20 milionoj“. Tiu cifero estis menciita en la 3-a sesio de la Internacia Konferenco pri Publika Edukado organizita de Unesco kaj la Internacia Oficejo de Edukado en Ĝenevo je la 1—10 julio 1968. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

NOVA SUKCESO DE ESPERANTO EN LA RADIOFONIO!

Konsiderinte la multajn petojn de aŭskultantoj de la Esperanto-programo de Pola Radio kaj rekonante la pravigintan valoron de la Internacia Lingvo en la radiofonio, kio esprimiĝis ĉefe en la letera reĥo, la Direkcio de la Pola Radio decidis pliampleksigi la ĝisnunan programon en la Internacia Lingvo de unu al tri duonhoraj disaŭdigoj ĉiutage. Tiu ĉi decido, sendube tre grava



La redaktoro de E-programo A. Petyn

por la tutmonda Esperanto-movado, komencos esti realigata jam de la mezo de oktobro 1968 j.

Oni devus kredi, ke la eŭropaj esperantistoj kun ĝojo akceptos ĉi tiun eventan fakton, des pli, ke la elsendhoroj esfas tiel fiksitaj, ke ĉiu povos elekti programon oportunan por si laŭ la horo.

Frumatene — je la 6,30 (per meza ondo 200 m kaj mallongaj ondoj: 25,09 m, 31,45 m, 42,11 m, 50,04 m) laŭ la mezeŭropa tempo — estos elsendata la unua programo. La dua programo aŭdigos, kiel ĝis nun, je la 16.30 (per mallongaj ondoj: 25,34 m kaj 31,50 m), kaj, fine, la tria programo estos aŭdebla vespere je la 23,30 (per meza ondo 200 m kaj per mallongaj: 25,09 m, 31,45 m, 42,11 m kaj 50,04 m). Ni atentigas, ke la matena disaŭdigo estas plena ripeto de la vespera programo.



En la nova kunmeto de la programo estos plivastigitaj la pollandaj temoj, laŭ la petoj de multaj aŭskultantoj, kiuj sugestis al la Pola Radio multajn interesajn por ili temojn. Samtempe pli da loko oni dediĉos al temoj koncernantaj la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-Movadon, kaj do interalie sabaton vespere oni trovos la duonhoran „Esperanto-ekspreson“, kiu estos ripetata dimanĉon matene; estos enprogramitaj trarigardoj de Esperanto-revuoj, prilingvaj elsendaĵoj, sonraportoj pri esperantistaj okazaĵoj, recenzoj de E-libroj, intervjuoj kun diverslandaj esperantistoj, Esperanto-kanzonoj ktp. Multe da loko oni dediĉos al la preparlaboroj por la Universala Kongreso en Helsinko. Tiamaniere la Esperanto-programoj de la Pola Radio fariĝos la plej rapida, riĉa kaj aktuala tutmonda informfonto pri la Movado, sed samtempe ili kontribuos al pliprofundigo de la lingvokono ankaŭ per specialaj konstantaj elsendaĵoj por komencantoj.

Tial do oni prenis en konsideron — verŝajne pli ol oni povis esperi — la multajn petojn kaj postulojn de la eŭropaj esperantistoj kaj oni pliampleksigis la programon. Tamen la estonteco

de tiu ĉi — oni verŝajne devas tiel ĝin nomi — eksperimento dependos de la aŭskultantoj mem, kaj pli precize de ilia reago, de la nombro da leteroj kaj poŝtkartoj alvenontaj al la Pola Radio. Ĉar finfine la korespondaĵoj estas la sola kriterio pri la bezono de la tiel ampleksa ĉiutaga Esperanto-programo. Kaj la esperantistoj scias, ke tia bezono tutcerte ekzistas. Aliflanke la fakto de ekzisto de ampleksaj Esperanto-programoj en la radiofonio montras la kreskantan valoron de la Internacia Lingvo por praktikaj celoj, ankaŭ por la neesperantista publiko — la valoron de Esperanto ĝenerale.

Lige kun la supra informo oni alvokas *diskonigi* ĝin kiel eble plej vaste, *instigi* al aŭskultado kaj skribado al la Pola Radio kaj jam nun *mendi* la senpage senditan koloran programinformilon pri la novaj elsendoj. La estonteco de la nova pliampleksigita Esperanto-programo de la Pola Radio estas en la manoj de ĉiu, kiu nun legas ĉi tiujn vortojn. Ne hezitu do, sed tuj diskonigu la eventon kaj mem skribu al:

*Pola Radio, Esperanto-Redakcio,
Varsovio, Pollando*

La Komisiono pri Turismo de Bulgara Esperantista Asocio kaj la estraro de la Turista Sekcio „Esperanto“ en urbo Sofio kun tristo informas, ke la 24-an de aŭgusto 1968 forpasis la aktiva esperantisto kaj turisto

GENO MITEV JORDANOV

Li estas naskita en 1897 en vilaĝo Vasil Levski, distrikto de Târgoviște. En 1918 li estiĝis ano de Bulgara Komunista Partio kaj iom poste, jam in-



struisto en PTT-Instituto, ellernis la Internacian Lingvon.

K-do Geno Mitev estas konata al multaj esperantistoj kaj turistoj, ĉar li estis unu el la plej bonaj kaj diligentaj senpagaj dommastroj de montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa.

La bulgara esperantista kaj turista movadoj perdis unu fidelan anon kaj batalanton por pli bona vivo, por paco, amikeco kaj solidareco inter la popoloj.

UEA deklaris Semajnon de Internacia Amikeco, kiu okazos unuan fojon en februaro 1969 j.

La celo estas: krei tradician feston en la E-movado, kiu samtempe povus populariĝi ankaŭ ekster la movado kaj tiel diskonigi la Internacian Lingvon. La Semajno pasos sub la devizo: „Amikeco trans la limoj — ŝtataj, lingvaj, kulturaj, politikaj, religiaj“. En la Semajno povus okazi festaj kunvenoj, dediĉitaj al la ideo de internacia amikeco kaj kunlaboro. Oni publikigos propagandajn materialojn en la gazetaro, disaŭdigos per la radio kaj, se eble, per la televido. Dum la Semajno oni interŝanĝos E-librojn ĵurnalojn, gazetojn kaj diversajn memordonaĵojn.

LA AMO, KIUN ISRAELO MALHELPAS

S-ro Admon Ilias Sa'ïd Haddad kaj f-ino Ovra Musa Zuel David geedziĝis la 28-an de julio 1968 j. en Kairo. Ili eskapis de Israelo pro persekutoj kaj turmentoj malhelpi ilian geedziĝon.

La Israelaj aŭtoritatoj ekĉesis ilin eksciinte, ke Admon, araba kristana junulo, amas la judan junulinon Ovra, kaj ke ili intencas geedziĝi.

La juna mekanikisto Admon rakontas: „En marto 1966 j. la israelaj aŭtoritatoj arestis kaj ĵetis min en malliberejon, kie oni turmentis min. Dufoje mi provis min mortigi, sed oni donis medicinan helpo al mi. . .

Post mia liberiĝo ni denove pripensis sekrete eskapi de tiu rasa malliberejo. Ni ja ko-

Estos eldonitaj salutkartoj kun teksto plurlingva, inkluzive en Esperanto, kiuj atentigos pri la Semajno kaj firmigos amikecon trans la limoj. Oni varbos kunlaboron de neesperantistaj organizaĵoj.

Dum la 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrido estis starigita tripersona Internacia Komitato por organizado de la Semajno. La Komitato eniris: la vicprezidanto de UEA s-ro Erik Carlén (el Svedio), kiu iniciatis la Semajnon, s-ro André Bourdeaux, respondeculo de la Informa Centro de UEA en Parizo, kaj s-ro Francis E. Helmuth — prezidanto de Esperantista Ligo de Norda Ameriko (ELNA).

mencis nian vojaĝon de Ramallah al Strio de Gazza. Dum tiu danĝera vojaĝo ni ĉiunmomente atendis morton pro la kugloj de la israelaj bordgardistoj. Fine ni atingis la Strion kaj poste iris en Kairon, kie oni donis al ni la rajton de politika rifuĝo. Ovra konvertiĝis al kristaneco, por ke ni povu geedziĝi kaj libere labori.“

La palestina junulo finas sian rakonton tiel:

„Ni vivas ĉi tie en Kairo kaj atendas la tagon, kiam la laŭleĝa popolo regajnos la Palestinan patrolandon, por ke ni povu reiri tien kaj araboj kaj judoj povos vivi tie en libereco kaj paco, sen rasa aŭ religia distingo.“

NAPALMO

Armilo de USA

La korespondanto de „Times“, London, skribas pri la napalmo:

„La viroj, kiuj gutigas napalmon, diras ke ili povas kompreni, kial ĝi fariĝis simbolo de ĉiuj aĵoj, kiujn multaj trovas malallogaj pri la milito en Vjetnamio. „Ĝi estas armilo de teruro“ — unu diras. „Homoj havas tion ĉi por bruli ĝis morto“ — diras dua. Ĉirkaŭ 1500 tunoj da napalmo estas gutigata dum unu monato. Ekbrulante kun multo kaj kolono de ruĝa fumo kaj olea nigra fumo, napalmo surŝpruciĝas kaj

Armilo de Israelo

etendiĝas en subteron. Oni multe rakontis pri soldataro sufokita de la subita elĉerpado de oksigeno, bezonata nutri la flamojn, sed oni pensis, ke la soldatoj mortis pro spirego de la trovarmigita aero. Iu ajn, kiu postvivis napalmatakon, estas ematimige bruliĝi kaj sen unuaklasa medicina prizorgo estus kondamnita al malrapida doloriga morto aŭ, en plej bona okazo, al konstanta malbeligado.

Neniu scias, kiom da viktimoj napalmo prenis en Vjetnamio.“



La 24-an de julio je la 7-a horo vespere el la televidiloj de la sudsiberia urbo Barnaul eksonis belsona kanto en iu nekonata lingvo. Estis „Adiaŭ maro“ en Esperanto plenumata de Emil Dimitrov sur magnetofona disko. Tiel komenciĝis la parolado de gasto al la 37 Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj Vladislav Romanov. En daŭro de dek minutoj li rakontis pri la laboro de la Kongreso, pri la preparo de la Festivalo, pri la gastameco de la bulgara popolo. La parolinto akcentis la nerompeblan amikecon inter la bulgara kaj soveta popoloj, kies esprimon li mem sentis en Bulgario ĉiupaŝe. La rakonto vekis grandan intereson inter telespektantoj de Barnaul kaj apuda kampara regiono.

TENDARO EN ALTAJ-MONTARO

La 10-a SEJT (Soveta Esperantista Junulara Tendaro) okazis ĉi-jare de la 16 ĝis la 26 de julio en Suda Siberio ĉe la lago Teleckoe. Junaj geesperantistoj el 23 urboj kaj 6 respublikoj de nia lando kunveturis en mirinde pitotoreskan lokon de Siberio kun sovaĝa arbaro, dumetra herbaro, montoj, rokoj kaj akvofaloj. Partoprenis ĉ. 100 geesperantistoj, reprezentantoj de 11 nacioj. Meza aĝo en la tendarano estis 24 jaroj.

La tendaro estis organizita de Barnaula Esperanto-Klubo, kiu faris grandan preparlaboron. La duetaĝa ligna dometo, en kiu loĝis la partoprenantoj, estis ornamita per verdaj steloj, flagoj kaj sloganoj. Ŝercaj pentraĵoj kun ŝercaj vortoj celis

ordon en la tendaro kaj kontraŭ „krokodilado“. Sur grandaj paperfolioj estis anticipe skribita la ĉiutaga tagordo. En ĝi estis antaŭviditaj tuttagaj piediro tra surmonta tajgo kaj surŝipa ekskurso laŭlonge de lago Teleckoe, amuzaj eroj, dancoj, libera tempo, ripozo.

Se oni volus koncize karakterizi la tendaron, eblas diri: estis tre gaje kaj utile. Ni multe kantis kaj ludis ĉe fajrujoj kaj ĉe la bordo de la lago, kelkfoje ĝis matenaj kokokrioj. Plej belaj eroj de la programo certe estis tri koncertoj, prezentitaj de ĉebaltaj, eŭropaj kaj aziaj grupoj. En konkurso de arta legado unuan premion prenis Nina Loĵkina el Alma-Ata. Multe ni ridegis dum gaja vespero. Vi ja nur imagu kiel knabo kaj knabino manĝigas unu la alian per kremo, se iliaj okuloj estas binditaj kaj en la manoj estas nur kulero kaj glaso da kremo! Aŭ „donbasa“ bokso: okuloj binditaj, oni



La junularo ekskursas

batas reciproke per dormsakoj! El aliaj eroj menciindas studado de novaj kantoj, maskobalo ĉe fajrujoj, festo de na-

skigoj, futbalmatĉo inter eŭropa kaj azia teamoj (4:4), k. a.

Sur la bordo de la lago okazis festo de Neptun. Neptun (B. Kolker) aperis kun granda listo, en kiu estis skribitaj „La pekoj“ de la partoprenintoj, kaj ordonis al la diabloj „bani sen ceremoni“ ĉiujn pekulojn. Vi povus imagi la punon, se la temperaturo de lago Teleckoe ne superis $+8^{\circ}$. Tamen por ĉiu okazo servis tendara kuracistino Ljuda Larionova el Barnaul.

Por ĉiam ni memoros ankaŭ la jenan okazon. Luvespere ni troviĝis ĉe la tabloj en la manĝejo. Ekstere nerimarkite venis fulmotondroj. Nian apetiton subite interrompis laŭtega kraksono. La sidantoj ĉe la fenestro eksentis, ke io pikis ilin, jen brakon, ĉe alia vangon, ĉe tria kruron ktp. En la supra parto de la fenestro aperis truo. Estis veninta fulmo. Tamen nelonge esperantistoj konstrernis. Anatolij Gonĉarov kaj Vitas Ŝilas subite ekkantis ŝercan turistan kanton „Glori, glori aliluĵa“ kaj preskaŭ centvoĉa ĥoro subtenis ilin. La pardono de la ĉielaj fortoj estis petita, oni daŭrigis manĝadon.

En la klubo de la turista bazo antaŭ neesperantistoj la moskva ĵurnalist A. Ĥarĵkovskij faris emocian prelegon pri Esperanto, la aspiranto A. Gonĉarov rakontis pri la E-kongreso en Hago kaj fine la instruisto el Ufa B. Kolker faris provlecionon. Du centoj da ĉeestantoj kun granda intereso aŭskultis ĉion kaj multaj el ili esprimis deziron lerni Esperanton.

Dum la II seminario de junaj aktivuloj, grupgvidantoj rakontis pri metodoj kaj ekzemploj de propagando kaj instruado de la Internacia Lingvo, pri la laboro de la E-klubo dum la pasinta lernoĵaro. Sekvis diskutoj pri la rolo de la renkontiĝoj, pri Esperanto kaj la scienco, pri la efiko de la murgazetoj, pri la kontaktoj kun oficialaj organizaĵoj, pri la regiona agado ktp. En la Somera Universitato ni aŭdis interesajn prelegojn: de docento B. Tokarev (Mo-

skvo) — „Rusa skolo en E-literaturo“ kaj „La granda E-poeto Nikolao Ĥoĥlov“, B. Kolker (Ufa) — pri teknikaj rimedoj de instruado de lingvoj, V. Ŝilas (Vilnius) — pri edukado de E gvidantoj, S. Ĥarĵkovskij (Moskvo) — pri la rusa E-poeto V. Eroŝenko. La partoprenantoj tre vigle en daŭro de kelkaj horoj pridiskutis la libron de Svadost „Kiel aperos universala lingvo“. Malgraŭ ke la aŭtoro kritike tuŝas Esperanton, la libro havas por la E-movado pozitivan valoron pro favora pritakso de la internacilingva problemoj kiel tuto — konkludis ni. La menciitaj prelegoj kaj diskutoj estis ne nur interesaj, sed ankaŭ bone perfektigis nian lingvon. La tendaro bone servis al la celo esti vera universitato por junaj geesperantistoj.

Nun pri la tendaro jam aperis artikoloj en lokaj gazetoj de diversaj urboj, ekzemple en Ĝambul, Barnaul, Mejdureĉensk, Ufa.

La sekvonta SEJT (la 11-a) okazos en Ukrainio, en Karpat-montaro, kiun ni ĉiuj jam senpacience atendas.

DECIDO DE SEJT-10:

1. Celo de SEJT estas pridiskuto de aktualaj problemoj de junulara E-movado, interŝanĝo de sperto.

2. SEJT estas destinata por junularaj akvivuloj de Soveta E-movado. Por altigo de tendara lingvonivelo kaj produktiveco, SEJT-ojn rajtas partopreni nur parolantaj gejunuloj kaj perspektivaj komencantoj.

3. SEJT-ojn povas partopreni ankaŭ plenaĝaj esperantistoj, kiuj en iu ajn formo laboras kun E-junularo.

4. Organizado kaj laboro de SEJT-oj estas afero de la tuta SEJ-movado. Respondeca organizanto estas loka E-grupo.

5. SEJT-11 okazu en Karpata montaro, dezirinde en aŭgusto (1969) en daŭro de du monatoj.